*************************************************************************

**INSTRU-CIRKULERO 2013/01 (februaro 2013)**

**Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj**

**************************************************************************

Karaj Gekolegoj,

Jen resumo pri kelkaj pasintaj kaj novaj eventoj kaj raporto pri la preparlaboroj de la plej grava evento en 2013: la 46a ILEI-konferenco en Herzberg/Sieber, en Germanio.

## I. Lernejaj projektoj kun eŭropa subvencio

Estas konate, ke malfacilas enkonduki Esperanto-instruadon en lernejoj, parte pro manko de laborkapacito de kvalifikitaj Esperanto-instruistoj, parte pro manko de subteno por tiu lingvo flanke de multaj lernejaj direktoroj.
Des pli ĝojige, ke ekde la lernojaro 2012/2013 du germanaj lernejoj sukcese partoprenas en eŭropa projekto Comenius (Dumviva Lernado Programo) kaj akiris financan subtenon por siaj internaciaj Esperanto-agadoj, vizitoj al partnerlernejoj. Gratulojn al la instruistoj, projektorganizantoj Christof Krick (Winterberg) kaj Zsófia Kóródy (Herzberg am Harz).

## II. Kursoj, klerigado, Bildungsurlaub

### 1. Intensa Esperanto-kurso

inter 04.03.2013 - 08.03.2013, anoncita ankaŭ kiel klerigcela feriosemajno (KVHS Osterode am Harz, Bildungsurlaubswoche) okazos en Herzberg am Harz ĉe Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg. Aliĝu ĉe http://www.kvhs-osterode.de/kursdetails.php?KursID=12083 aŭ/kaj ĉe http://ic-herzberg.de aŭ skribu al zsofia.korody@esperanto.de.
40-hora instruado por komencantoj kaj konversaciemuloj. Instruos: Peter Zilvar, Zsófia Kóródy

Sekvaj kursdatoj en Herzberg por A1-C1 niveloj: 5-12 julio 2013, 1-3 novembro 2013

### 2. Klerigkursoj, studsesioj

GEA kaj AGEI ofertas konstantan klerigadon, ne nur lingve, sed ankaŭ fake (ekz. pri literaturo, kulturo, didaktiko, instrumetodoj, interlingvistiko, lingvistiko, historio de Esperanto, minoritataj lingvoj, ktp.).
En la temaro estas ankaŭ instruado pri organizaj kaj movadaj scioj (strukturo de la E-movado, organizado, internaciaj projektoj, informado kaj varbado, argumentado, kreativeco, ktp.).

Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg servas la klerigadon per specialaj seminarioj, studmoduloj. Klerigkajeroj, tre signifa, ordigita biblioteko, fakliteraturo kaj arkivmaterialoj estas je via dispono. Prelegantoj, fakuloj el Germanio kaj eksterlando.
Atestilo: GEA-studdiplomo post sukcesa surloka kaj hejma studado.

Kondiĉoj: Membroj de GEA ricevas rabaton. GEJ-membroj ricevas senkotizan studadeblon. Tre favoraj loĝ- kaj manĝebloj. Detaloj ĉe http://ic-herzberg.de

Datoj: 09-12 majo 2013, 20-22 septembro 2013, 13-15 decembro, 28.12.2013 – 02.01.2014

Specialaj klerigofertoj ankaŭ dum Printempa Semajno Internacia (PSI) en St. Andreasberg (23.03-01.04 2013) kaj en Germana Esperanto-Kongreso en Nürnberg (17-20 majo 2013).
Rete: http://ic-herzberg.de/page.php?pid=81093452

Ni povos sendi al vi informfolion pri la GEA-Studprogramo kaj laŭ deziro ni povos sendi al vi ankaŭ la "Esperanto-kalendaron 2013" de la Germana Esperanto-Centro.

## III. KER-ekzamenoj en Germanio

Por doni eblon al germanaj (kaj alilandaj) Esperanto-parolantoj trapasi la prestiĝan internacian UEA/ITK KER-ekzamenon, mi anoncis la sekvajn ekzamensesiojn:

- dum GEK (17-20 majo 2013) en Nürnberg

http://www.esperanto-nuernberg.de/e/eo/932162/main/gekekzamen:
skribaj kaj parolaj lingvaj kapabloj en niveloj B1, B2 kaj C1. La atestita rezulto donos kompareblon al alilingvaj kapabloj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro. La skriba ekzameno okazos la 19an de majo 2013, la parolan parton ni taŭge akordigos kun la ceteraj programeroj de la kongreso.

La 18an de majo 8:45-9:00 Zsófia Kóródy donos informojn pri KER-ekzamenoj.
Eluzu la bonŝancon kaj anoncu vin ekzameniĝi, indikante la nivelon ĉe edukado.net, kie vi trovas retan aliĝilon kaj ĉiujn bezonatajn informojn pri aliĝo, kostoj, postularo.
Limdato por aliĝo: 31.03.2013. Petu detalojn de Zsófia Kóródy, zsofia.korody@esperanto.de

- la 8an de junio okazos la dua tutmonda KER-tago. Ĝis nun en Germanio planas okazigi ekzamenojn Berlin kaj Blieskastel. Detaloj ĉe http://edukado.net/ekzamenoj/ker/tutmonda/duapub

- dum al ILEI-konferenco (12-18 julio 2013 en Herzberg am Harz / Sieber) http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de eblos trapasi la UEA/ITK KER-ekzamenojn en B2 kaj C1 niveloj. Ni nepre rekomendas ĝin, eluzu la eblon kaj akiru valoran atestilon pri via lingvokono. Bonvolu aliĝi ĝustatempe (ĝis fino de junio!)

## IV. AGEI (http://esperanto.de/agei)

**1. AGEI-membrokotizo por 2013**

La membrokotizo por AGEI restos 25 EUR ankaŭ en 2013. Se vi ne donis enkasigrajton al la kasisto de AGEI (Christof Krick), bv. ne forgesi pagi vian membrokotizon kaj renovigi vian membrecon por ricevi la fakan gazeton IPR (la membrokotizo enhavas la abonon). Ankaŭ novaj membroj estas bonvenaj. Konto: Volksbank Schmallenberg, BLZ 46062817, Konto Nr. 5187110500
Bv. informi nin, se vi havas novan adreson, retadreson.

**2. AGEI-jarĉefkunveno: dum GEK (17-20.05.2013) en Nürnberg**

Dato de nia kunsido: 18.05.2013, sabato inter 13:45-14:45, loko: Caritas-Pirckheimer-Haus CPH, Königstrasse 64, 90402 Nürnberg, www.cph-nuernberg.de
Detaloj, aliĝeblo: http://www.esperanto-nuernberg.de/e/eo/770063/main/gekextern
(La Esperanto-grupo en Nürnberg estas la plej malnova Esperanto-grupo. Ĝi estas fondita en la jaro 1888, do nur unu jaron post la eldono de la unua lernolibro de Esperanto.
Festopreleganto estos Humphrey Tonkin, profesoro kaj konata esperantisto el Usono)

## V. Lernmaterialoj, vortaroj

"Bildvortaro en Esperanto" de Petro Desmet' kaj Jozefo Horvath: Flandra Esperanto-Ligo eldonis la 800-paĝan vortaregon, kiu baziĝas sur la sesa eldono de la germana prototipo (Duden – Das Bildwörterbuch). Ĝi enhavas terminojn por miloj da objektoj difinitaj per bildoj kaj 34-paĝan indekson. Prezo: 36.00 eur. Por ŝpari sendokostojn vi povas mendi, aĉeti ĝin ankaŭ ĉe Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro, 37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6

Die MIA-SERIO: libroj (ankaŭ en pdf-formato), kasedoj, KD-oj
Mia Serurtruo, Mia Lernolibro, Mia Intensa Kurso, Mia Gramatiko I, My Eagle Course
Detaloj, informoj: http://www.preisguenstig-kaufen.de/Esperanto-Lehrbuecher-JosefSchiffer.html
Aŭtoro, eldoninto: Josef Schiffer, Wilstorfstr. 58, 78050 Villingen-Schwenningen, Tel. 07721 – 58991, Josef.Schiffer@t-online.de

Manlibro pri la instruado de Esperanto. 150 paĝoj. 210x145mm. Eldonis ILEI, kaj E@I. Tria eldono: 2008. ISBN 80-969042-6-4. Prezo: 8,50 EUR plus 10% por sendokostoj.

Esperanto de nivelo al nivelo (preparlibro al la UEA-KER ekzamenoj B1, B2, C1). Eldonis Idegennyelvi Továbbképző Központ. Budapest. 2008. 136 paĝoj. Prezo: 10.50 EUR plus sendokostoj.
Mendu ilin ĉe Zsófia Kóródy, 37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6

## VI. 46a ILEI-KONFERENCO en Herzberg am Harz (Sieber) 12-18 julio 2013

**Dumviva lernado: Instruado de Esperanto al ĉiuj generacioj**

Jam aliĝis 40 personoj el 19 landoj, 4 kontinentoj!
Ni esperas, ke multaj eluzos la bonŝancon partopreni ĝin, ja la temoj estas interesaj, utilaj (projektoj, instruado, metodoj, lernmaterialoj, ktp.) ne nur por instruistoj, sed por ĉiuj, kiuj ŝatus disvastigi Esperanton kaj lerni, spertiĝi pri tio, renkonti fakulojn.

Dum la konferenco okazos kun Katalin Kovats (edukado.net) ankaŭ trejnsesio kiu ne havos apartan kotizon! Do ĝi estas en la konferenca kotizo,

**Nur 50 EUR por AGEI/ILEI-membroj, 25 EUR por gejunuloj (ĝis 30-jaroj)!**

Loĝado eblas tre favore ekz. en la Esperanto-hotelo Zum Pass en Herzberg-Sieber aŭ en komfortaj feriodomoj. Certigu vian lokon en la trejnkurso, aliĝu al la internacia konferenco.

Programo de la metodika seminario dum la 46a ILEI-konferenco
Gvidanto: Katalin Kovats, redaktoro de www.edukado.net

Okazos en 6 blokoj - entute 20 +4 horoj. Ni laboros ĉefe posttagmeze aŭ vespere por ke la partoprenantoj povu ĉeesti la konferencajn prelegojn kaj programojn matene. Dum la tuttaga ekskurso ne okzos seminario. La formo de la seminario estos: prelegoj ene de la seminario kaj ekster ĝi en la konferenco, aktivaĵoj, observo de kursoj.
Necesos antaŭaliĝo, ĉar jam antaŭ la seminario estos reta preparprogramo kaj kelkaj hejmtaskoj. Bv. indiki vian partoprenon sur la aliĝilo, laŭeble uzu la retan version ĉe
http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de

- Modernaj kaj efikaj metodoj / Ekzercotipoj - ankaŭ en la praktiko / Instruado de gramatiko
- Lingvaj kapabloj kaj malfortoj de individuoj / Celorientitaj aktivaĵoj por efika memlernado
- Kurs- kaj lecionplanado / Sukcesigo de kursoj kaj lecionoj / Modernaj lerniloj
- Interreto cele al lingvolernado / edukado.net - fonto de lern- kaj instrumaterialoj / Retaj kursoj de la KLERIGEJO
- Taksado kaj memtaksado / Ekzamensistemoj por Esperanto / Ekzamenspecimenoj
- Psikologiaj faktoroj de lingvolernado / Instruado por diversaĝaj lernantoj / Motivigo

Aliaj programeroj: Fakaj prelegoj, klerigsesioj pri projektoj kaj subvenciado, fakkunsidoj, diskutforumo, B2 kaj C1 KER-ekzamenoj, ILEI-lernejo por 12-18 jaraj lernantoj kun Somera Arbara Lernejo (SALO 8), observeblo de modellecionoj, spertinterŝanĝo, kulturaj eventoj, internacia balo, ekskursoj al Hannover, Goslar kaj la Harz-montaro, Göttingen.

## VII. Alvokoj, informoj

### 1. Arbeitskreis Esperanto 91301 Forchheim: Esperanto-Intensiv

Der Kurs richtet sich an jene, die die 16 Regeln der Grammatik kennenlernen wollen, einfache Sätze sprechen lernen und sich informieren, wie man im Internet weiterlernen kann.
Material wird gestellt, Anmeldung im Kurs direkt oder bei der VHS-Forchheim KursNr. Fo396 Vormittag oder KursNr. Fo397

Kursleiterin: Evelin Geist, VHS-Pavillon beim Herder-Gymnasium P3, Luitpoldstraße 1 – Forchheim
Samstag, 16. März 10.00 – 13.00 Uhr und/oder 13.00 – 16.00 Uhr, Teilnahmegebühr: 10,00 Euro

### 2. Interlingvistiko kaj esperantologio daŭre ĉeestas en la paletro de UAM

Jam de 15 jaroj fino de septembro kaj komenco de februaro estas dediĉita al la intensaj sesioj de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz. Ili havas firman lokon en la universitata paletro kaj proponas universitatnivelan studadon kun fina atestilo al ambiciaj esperantistoj. Ili entreprenas ankaŭ la formadon de esperanto-instruistoj. En la tria jaro de la Studoj okazas instsruista specialiĝo. Kunlabore kun ILEI tio kiel instruista trejnado estas ofertata ankaŭ al pli vasta publiko, kiu volas instruistan spertiĝon dum unu jaro. Aliĝantoj estas atendataj por la septembra sesio (14-20). Informoj: en la retpaĝo de la Studoj kaj interlin@amu.edu.pl.
ILEI laboros kun UEA por oferti kelkajn stipendiojn por elektitaj homoj, kiuj povas montri klarajn intencojn poste efektive instrui la lingvon.

**3. Wettbewerbe und Ausschreibungen** Europäischer Wettbewerb: Jetzt mitmachen
Im Schuljahr 2012/13 bietet der Europäische Wettbewerb in Kooperation mit dem Pädagogischen Austauschdienst erstmals einen internationalen Online-Wettbewerb an unter dem Motto "Wir sind Europa! Wir reden mit!".
Die Zusammenarbeit der Wettbewerbsteilnehmer findet über die eTwinning-Plattform statt. Zur Verfügung stehen Unterrichtsvorschläge für verschiedene Altersgruppen. Einsendeschluss für die Beiträge ist der 15. Juni 2013.
http://www.europaeischer-wettbewerb.de/etwinning/zusammenfassung/
http://www.europaeischer-wettbewerb.de/index.php?id=19725

**4. La Tradiciaj Oktobraj Pedagogiaj Tagoj (TORPEDo)** ne okazos en 2013, ja dum la ILEI-konferenco gekolegoj havos la eblon aŭskulti fakprelegojn, partopreni metodikan trejnseminarion, observi modellecionojn, kontakti fakulojn kaj interŝanĝi spertojn kun eksterlandaj gekolegoj.

**5. Tradukemuloj serĉataj**

Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg alvokas tradukemulojn kontribui al la tradukprojekto 'Nacia Parko Harz'. La laboro komenciĝis antaŭ ĉ. 1 jaro kaj jam estas duone aŭ tute pretaj multaj tekstoj de la hejmpaĝo de la Nacia Parko kaj pluraj broŝuroj (ekz. pri la linko, pri Torfhaus, Lonau, la Goethe-vojo al Brocken).

Interesiĝantoj bv. kontakti Peter Zilvar aŭ Zsofia Korody, 37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6, 05521-5983, esperanto-zentrum@web.de kaj laŭeble partopreni la sekvan traduksesion en Herzberg inter 20-22 septembro 2013.

## VIII. Lerneja instruado

Alvoko al lernejaj kaj eksterlernejaj instruantoj, kursgvidantoj: Bv. anonci vian kurson ĉe Zsofia Korody aŭ rekte ĉe http://edukado.net/kursejo

Ni kore dankas la helpon de gesinjoroj Molnar el Hungario, kiuj ĉiujare kompilas listojn de Esperanto-lernejoj en baza, meza kaj supera niveloj. Laŭ akiritaj informoj jen eta statistiko el Germanio:

Unuagradaj lernejoj:

- Nicolai Grundschule, 37412 Herzberg am Harz, http://nicolaischule-herzberg.de, (Zsófia Kóródy kaj Ewa Kukielka)

Duagradaj lernejoj:

- E-M-A Gymnasium, 37412 Herzberg am Harz, http://www.ema-gym.de (Zsófia Kóródy)
- Oberschule Herzberg, 37412 Herzberg am Harz, (Zsófia Kóródy)
- Gymnasium des Schulzweckverbandes, 59955 Winterberg, (Christof Krick)
- Evangelisches Ratsgymnasium Erfurt, http://www.evrg-erfurt.de (Bernhard Schwaiger)
- Meza lernejo, 99302 Arnstadt, (Corinna Schwaiger)
- Halepaghenschule; http://www.halepaghen-schule.de; 21614 Buxtehude (Jutta Chikato)

Ne raportis en 2012-13: Bertolt-Brecht-Gymnasium, Dresden; (Benoit Philippe)
Alte Landesschule, Korbach, 34125 Kassel, (Norbert Bludau)

Triagradaj lernejoj, universitatoj:

- Vestfaluja Vilhelma Universitato, Münster, http://www.esperanto.de/lehrbuch; (d-ro Rudolf Fischer)
- Hochschule Emden/Leer; http://hs.kurso.info kaj http://hs.esperanto-emden.de, 26723 Emden, (Sebastian Kirf)
- Sprachzentrum Universität Stuttgart; 70174 Stuttgart, Baden Württemberg; http://lsf.uni-stuttgart.de/qisserver; (d-ro Johannes Mueller)

Dezirante al vi sukcesajn kursojn, rezultodonan agadon por Esperanto,

Herzberg am Harz, 26.02.2013

Zsófia Kóródy
komisiito de GEA por instruado
prezidanto de AGEI
zsofia.korody@esperanto.de
37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6
Tel, fakso: 05521-5983
http://esperanto.de/agei